# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**

**PLENUMITA 10/02/2022 Kvincentsesdeknaŭa eldono (unua eldono 20/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

***Uzindaj ligoj*** *Google Translate* *Plena Ilustrita Vortaro* *Freelang Vortaro* *lingvohelpilo* *PMEGramatiko* *Esperanta Retradio* *Plena Analiza Gramatiko*

*Pasintaj AE eldonoj* *Esperanta himno* *duolingo entute* *openclipart.*

**Forĵetu viajn vortarojn. Uzu** *Google Translate* **kiel vortaron**

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**

## Entute 773,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo

Nun studas **293,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **197,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **176,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)

Nun studas **107,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )

Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde junio 2022)

## Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**

Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la kronviruso. Do portu maskojn. *Roger Springer*



la esperanta retradio donas bonan ĉirkaŭ-5-minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon.



LA PAROLANTAJ ŜUOJ

2a Feb 2022

(*Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917*



## EKSTRAĴOJ POR LECIONOJ DE "THE ESPERANTO-TEACHER"

(de Mason Stuttard). Numero 2 de "Por progresantoj".

**GRAMATIKAJ GVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:**

1). Kiuj finaĵoj estas la nuraj kiuj indikas verbon?

2). Ĉu la kernvorto de la predikato estas ĉiam verbo? Kaj de la predikativo?

3). Kiuj estas la specoj de la nenecesaj partoj de Esperanta frazo?

4). La predikativo povas referenci al AŬ la Subjekto AŬ la Objekto de la frazo. Donu ekzemplon de ĉiu el la du kazoj.

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. numero 569 . *Marcel Leereveld.*

# Semajno de Internacia Amikeco

Provizora programo, ZOOM, 26.2. 12.00-16.00 (UTC+1)

## Esperanto kaj amikeco

Stefan MacGill (Hungario): Enkonduko

Barbara Pietrzak (Pollando): SIA, granda integriga kampanjo de UEA

Mireille Grosjean (Svislando): Nekredebla fido

KIMURA Goro Christoph (Japanio): Amikeco, kiu eltenas diferencojn: defio por Esperantujo

Milton Paulo de Lacerda (Brazilo): Amiko estas trezoro

Martina Kvarantan Šmitran (Kroatio): Amikeco sub lupeo

Monika Molnar kaj la lernantoj de la lernejo "Grande Ourse" (Svislando): Infana percepto de amikeco unuopaj ekzemploj de amikeco dank'/per Esperanto

Proklamo de la rezultoj de la foto-konkurso "Amikeco"

Stefan MacGill: Fermo

## koncerto:

Ĵomart kaj Nataša (Svedio) Kajto (Nederlando) Luis Obando kaj Jahir Cataño (Kolombio)

**Lige al la Seminario, okazos la foto-konkurso.** V. https://eventaservo.org/e/72a440

Kiuj deziras partopreni, bv. aliĝi almenaŭ du horoj antaŭ la komenco.

Aliĝilo: https://bit.ly/3Innskm Informoj: kes.heu@gmail.com Informis AE *Katja Steele*

OPINIO: Anstataŭ savi komercojn, estas tempo savi la homojn

# VORTOJ: UEA PARTNERAS EN NOVA EU-PROJEKTO

UEA partoprenas en unu plia projekto subvenciita de Eŭropa Unio (EU), nome **Vortoj**, kiu disvolviĝos kadre de la programo Erasmus+ por bazlerneja edukado, akceptita de la slovaka nacia agentejo de Eŭropa Komisiono kun entuta buĝeto de 196 503 EUR. **Vortoj** estas elpensita kaj kunordigata de E@I, kaj UEA estas unu el la partneroj. Ĝia ĉefa celo estas disponigo de interaga komputila ludo por lingvolernado en noviga maniero. Sukcese testita beta-versio, originale en Esperanto kaj bazo por la subvencipeto, jam estis prezentita dum kelkaj eventoj, inter ili la 75-a Internacia Junulara Kongreso en Liptovský Hrádok, Slovakio, de 2019.

La ludo kombinas uzon de ludtapiŝo kaj projekciadon de vortoj. Per paŝoj aŭ saltoj sur la tapiŝo ludantoj devas trafe elekti inter moviĝantaj vortoj laŭ la diversaj proponitaj defioj. Laŭ la prezento de la ludo “**Vortoj** estas komputila ludo de reflekso, lingvoj kaj mojoseco! Per **Vortoj** oni praktikos lingvojn kaj plicertiĝos pri literumado de vortoj, amuziĝante dum kursoj kun amikoj kaj kolegoj”. Ĉar **Vortoj** uzas la danctapiŝon de la fama ludo *Dance Dance Revolution* (DRR, “Danco-Danco-Revolucio”) kaj devigas ludantojn paŝadi kaj saltadi, ĝi estas vigliga! kaj oportuna por la korpa sano de infanoj kaj junuloj, kiuj samtempe povas praktiki lingvojn per rekono kaj elekto de ĝustaj vortoj. Per projekciado la ludo aperigas surekrane aŭ surmure moviĝantajn vortojn kaj ludanto devas fari konkretan movon sur la danctapiŝo por elekti vortojn depende de ilia ĝusteco. Aldone la ludo ankaŭ estis elpensita por aktiva uzo fare de instruistoj, ebligante al ili propran vortredaktadon kaj kreon de novaj defioj laŭ iliaj specifaj bezonoj. Por funkciigi la ludon sufiĉas havi ludtapiŝon kable konektitan al komputilo (kaj projekciilon, se oni deziras projekcii surmuren). Ĉiuj tiuj trajtoj faras el **Vortoj** ludon unikan kaj speciale taŭgan por kursoj, lernejoj kaj eventoj.

Kiel EU-projekto **Vortoj** daŭras du jarojn: de la 1-a de januaro 2022 ĝis la 31-a de decembro 2023. Dum tiu tempo la partneroj devos plenumi diversajn taskojn, i.a. funkciigon de la ludo en 11 lingvoj. La partneroj estas: E@I (el Nová Dubnica, SK), UEA (el Roterdamo, NL), Kultura Esperanto-Asocio (KEA, el Budapeŝto, HU), INALCO (el Parizo, FR) kaj Privata Lernejo Nová Dubnica (el Nová Dubnica, SK). Tri el la kvin partneroj estas Esperanto-organizaĵoj. UEA aparte kunlaboros pri tradukado, testado, programado kaj fine pri la diskonigo de la ludo. La projekta retejo estas www.vortoj.net (nuntempe nur en la slovaka; plurlingva versio prepariĝas).

Kiel informas Peter Baláž, kunordiganto de E@I, “**Vortoj** estos tre taŭga ilo por neformala edukado kaj ni esperas, ke ĝi ankaŭ trovos sian vojon en la formala eduk-sistemo de diversaj landoj, uzota de instruistoj dum lingvo-lecionoj. Mi povas bone imagi ĝin kiel finan aktivecon de lecionoj, kiam lernantoj jam estas relative lacaj, malpli bone atentas kaj bezonas ĝuste tian energi-injekton. Estas nia plano ĝin prezenti ankaŭ al esperantistoj: esperinde jam dum la ĉi-jara Universala Kongreso en Montrealo! Ni esperas, ke baldaŭ multaj uzos ĝin, amuziĝos kaj praktikos sian vortostokon.”

Informis AE *Katja Steele*



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917



# Historio de la faktoj de mia vivo.

**(5)** Kiam mi estis sesjara, mi oficiale kaj aŭtomate devis vizitadi elementan lernejon. Sed miaj gepatroj opiniis, pro Jean-Jacques Rousseau, ke lernejvizitado estas malbona por la karaktero de infanoj. Sed la ŝtata edukinspektoro donis al mia patro la rajton mem instrui min. Tamen mia patro ne kapablis instrui min, ĉar plejofte mi laboris en mia ĝardeneto kreskigi legomojn. Mi lernis iomete da aritmetiko, ĉar tion mi trovis facila, kaj mi facile lernis pri la gepatra lingvo kio estis en la lernolibretoj. Sed mi malbone kapablis skribi nete, kaj tial nun, naŭdek jarojn poste, mia skribo estas malbela. Post kelkaj jaroj da malsukcesa hejmlernado, mia patro kaj la inspektoro konkludis, ke mi devis transiri al lerneja instruado. Mia tiea instruistino promesis al la inspektoro speciale helpi min pri mia manskribado, sed ŝi neniam faris tion ĉar ŝi malamis ke mia patro trovis lernejojn malbonaj por infanoj . Por la resto de la elementaj jaroj mi ĉiam estis la plej bona en la klaso. Ĉu eble pro memlernado dum la unuaj tri edukjaroj? Post la elementa lernejo mi deziris studi por esti kuracisto, sed la lernejestro diris al mia patro ke tio estus tro malfacila por mi ĉar mi ne havis sufiĉe da mono por vizitadi pli necesan altnivelan mezlernejon. Kelkajn jarojn poste mi decidis ke mi deziras fariĝi operkantisto, sed ankaŭ por tio mi bezonis tro da mono.

**6)** Pro la kapitalismo tre multaj homoj estis senlaboraj kaj ne havis iun ajn ŝancon ricevi laborpostenon. Ankaŭ la infanoj sciis, ke ili restos senlaboraj dum la tuta vivo. Ili vizitadis lernejojn specialajn por senlaboruloj, sed ankaŭ tio tre malofte rezultis en laboron. Tio estis ankaŭ mia kazo, ĝis la jaro 1936. Antaŭ tio mi do havis multan tempon por lerni lingvojn, kion mi faris. Tiuj lernejoj estis senpagaj por senlaboruloj. Ankaŭ senpaga estis lerni sportojn, kaj mi lernis boksadon dum du jaroj. Ege malbonajn laborpostenojn oni devis akcepti, ĝis ĝi malsanigis onin.

**(7)** En la lastaj jaroj de la 1920-aj kaj la unuaj jaroj de la 1930-aj jaroj ekzistis en Germanujo, kaj en multaj aliaj landoj eŭropaj, demokretecaj registaroj kun multpartiaj parlamentoj. Inter la politikaj partioj ekzistis ankaŭ komunistaj, kelkfoje sufiĉe grandaj, kaj faŝistaj partioj, ĉiam malgrandaj. Kiel parto de sia propagando tiuj malgrandaj partioj okazigis interbatalojn en la stratoj, kriante sloganojn k.t.p. Ili neniam rezultis en vundojn aŭ mortigojn. Sed ili donis laboron kaj amuzon al la policoj. Mi estis juna interaĝulo kaj unu tagon diris al miaj gepatroj ke mi partoprenos en tiuj bataloj. Mia patrino timis, kaj ordonis mian patron akompani min. Tio estis riska, ĉar la polico atakis ribelulojn kiuj hazarde troviĝis solaj de la amasoj. Tio okazis ankaŭ al ni kaj la policano ordonis al sia hundo forŝiri la veluran (velvet) veston de mia patro. Tiu vesto estis multekosta, ĉar mia patro estis artisto, kaj krome ne antaŭvidis tian atakon. La sekvantan tagon amiko nia konsilis al mia patro peti la helpon de loka parlamentano por ricevi kompenson de la polico. Li povis fari tion ĉar li povis pruvi ke li ne apartenis al la ribeluloj sed promenis al la domo de sia patrino kiu loĝis tute proksime en riĉula strato (ĉe la Vondelparko). La Laborpartia parlamentano sukcesis konvinki la urban registaron doni la monon por aĉeti novan veluran jakon por mia patro. Post tio mi ne ree klopodis partopreni en stratribeloj. Cetere mi ŝanĝiĝis de komunisto al anarĥiisto, kiuj ne stratribelis. *Marcel Leereveld.*

Baldaŭ aŭstralianoj voĉdonos por decidi kiuj kontrolas la novan parlamenton.
Ĉu vi remarkas ke neniu partio subtenas pacon?
Ĉu milito aŭ paco ne estas la plej granda decido por la popolo?
Ĉu la problemo estas ke militi aŭ ne, ne estas decido de Aŭstralianoj sed de Britujo aŭ Usono?
Nur la *Green* partio subtenas pacon sed ne kiel grandan celon. Kial?? *Roger Springer*

## SOLVOJ DE LA KVIZETOJ:

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917*



1). –as; -is; -os; -us; -u; kaj –i.
2). De la predikato" Jes, ĉiam verbo. De la predikativo: Nur kiam ĝi estas infinitivo: "Ni igis LIN retroveni"
3). La Objekto kaj la Adjektoj.
4). "La viro estas PREZIDANTO" k.t.p., kaj " Ni elektis la viron PREZIDANTO", k.t.p. .

*Marcel Leereveld.*

**3ZZZ** Se vi ŝatas aŭskulti Marcel paroli pri sia vivo , aŭskultu la elsendon de la 7a de februaro 2022. Plie ĝi enhavas informojn pri floroj . *Franciska Toubale*





Mia bela Vanda orkideo floras nun en mia ĝardeno proksime de Brizbano
*Petro Danzer*



**En la angla, sed estas deviga informo por la paco Klaku!**
[(20) The Hill on Twitter: "Reporter: "It's an action that you say they have taken, but you have shown no evidence to confirm that. [...] This is like - crisis actors? Really? This is like Alex Jones territory you're getting into now." Must-watch exchange between @APDiploWriter Matt Lee and @StateDeptSpox. https://t.co/RPIPb2zwf5" / Twitter]

Alternativaj Novaĵoj https://www.greanvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/